

Enhavo

- **anoncoj**

Raporto de la elektokomisiono; *Paralela Universo* venos; Senkrokodila Semajnfino en Novjorkio; Mez-Kanada Renkontiĝo; Montreala lingvofestivalo; Novaj varoj en la retbutiko; Simpozio en Novjorko; Forpaso; Korespondi deziras

- **media hits**

Princeton Alumni Weekly, *The Jewish News of Northern California*; *WNYC radio*; *Stanford News*

- **loke**

Prelego pri Esperanto en Sovetunio; Esther SCHOR kaj Sam GREEN prezentis ĉe NYPL

- **Donations received last year**

de la centra oficejo - Vilĉjo Harris
A list of funds and the total donations to each last year.

- **de la estraro**

Raportoj de la direktoroj kaj aliaj estraranoj.

- **Aŭtuno en Printempo**

libroj - Steve Eichblatt
La rakonto estas simpla kaj nelonga kun malmultaj roluloj. Samtempe, la lingvaĵo ŝajnas riĉa, flua kaj bela.

- **La filozofio kiel feliĉilo**

historie - Hiram Crespo
Anstataŭ ol promesi feliĉon ĉielan, la epikura filozofio helpas trovi feliĉon en la mondo aktuala.

- **Mielmonato en Krimeo**

vojaĝe tra la mondo - Jed Meltzer
Kvankam ni ne antaŭe konsideris iri al tiu regiono, la ideo ĉeesti Esperantan renkontiĝon dum nia mielmonato estis ja alloga.

- **Likva kolumno de tri koloroj**

scienco - Vilĉjo Harris
Ĝi povas esti agrabla tabla dekoracio kiu aldonas ĉarmon al ajna ĉambro.

- **Murdo en oficejo**

enigmoj - Daĉjo Rutan
La kadavro kuŝis sur la planko, malantaŭ skribotablo. Apud ĝia maldekstra mano estis malgranda pistolo de eksterlanda marko.

- **F*ka**

senintenca esperantaĵo?
Danĝera markonomo.

- **La soifa jaĥtisto**

enigmo-solvoj



Usona Esperantisto

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atentu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia TTT-paĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style manual on our website.

Raporto de la elektokomisiono

Mi, Ron GLOSSOP, Jordan KALILICH, Dominique LAFLAMME, kaj Julie SCHWARTZ estis elektitaj de la Prezidanto de Esperanto-USA kiel membroj de la Eleko-komisiono por 2017.

Laŭ Bill HARRIS, estro de la Centra Oficejo, ni devas nomumi kandidatojn por la oficoj de Prezidanto, Vic-prezidanto, kaj tri por la oficoj de Direktoroj. Ni petis ke vi proponu kandidatojn ĝis la 1-a de Marto.

La rezulto de la nomumada procezo estas la jenaj nomumuloj:

Nomo	Ofico
Filipo Dorcas	Prezidanto
Ben Speakmon	Vic-prezidanto
Charlotte Burton	Estrarano
John Dale	Estrarano
Aziz Diallo	Estrarano
Paige Feldmann	Estrarano
Christopher Johnson	Estrarano
Nikvo Woods	Estrarano

— Fred MEYER, III, Estro de la Elektokomisiono, 2017

Paralela Universo venos

Grandaj kongresoj estas bonegaj spertoj, sed ne ĉiam eblas vojaĝi longe. Paralela Universo estas tago de lokaj renkontiĝoj, okazante samtempe la 19-an de Aŭgusto, 2017. En 2016, 231 esperantistoj partoprenis 25 apartajn eventojn en kvar landoj de Nord-Ameriko. En 2017, la afero estos eĉ pli granda, kaj inkluzivos minimume ankaŭ Sud-Amerikon. Por plena informo, inkluzive kiel vi



povas organizi eventon en via urbo (estas tre facile!), vidu <http://paralelauniverso.com> [<http://paralelauniverso.com>].

Senkrokodila Semajnfino en Novjorkio

Raúl J. GARCÍA de la Esperanto-Asocio de Novjorko organizas tenduman Senkrokodilan Semajnfino de la 3-a ĝis la 4-a de Junio. Ĝi okazos ĉe la Kampadejo *North-South Lake* en la bela Katskil-montaro (angle, *Catskills*) en suda Novjorkio. Apudas lagoj, plaĝoj, necesejoj, kaj duŝejoj kun varma akvo.



Raúl mem gvidos ekskursojn al Breto de Newman (*Newman's Ledge*) kaj la akvofalo *Kaaterskill*. Por pli da informo, vizitu la retpaĝon de la kunveno [<https://goo.gl/bblh5o>] aŭ sendi retpoŝton al <rauljgarcia@gmail.com>.

Mez-Kanada Renkontiĝo

Esperanto-Toronto invitas vin al la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) [<http://mekaro.ca>] de la 20-a ĝis la 22-a de Majo 2017. MeKaRo estas ĝuinda, malstreĉiga semajnfino de amikeco, turismo, kaj neniuj prelegoj! Ekde 2003 MeKaRo okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en Majo, t.e., la semajnfino de la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktorina Tago en Ontario (krom en jaroj, kiam okazas pli granda kongreso en la regiono).

MeKaRo 2017 okazos en nia najbara urbo Hamiltono por la unua fojo. Laŭ la MeKaRa tradicio, la programo [<http://mekaro.ca/programo.php>] inkluzivos turismajn ekskursojn kaj komunajn manĝojn. Ni havos tutan semajnfino por ĉiuj – anglalingvanoj, franclingvanoj, kaj alilingvanoj – interkonatiĝi, babilante en Esperanto.



Hamilton

Ni ne havas oficialan amasloĝejon, do necesas, ke ĉiu partoprenonto aranĝu sian propran loĝadon. Pluraj hoteloj troviĝas en Hamiltono, aparte en la urbocentro, kaj ni havas tri apartajn sugestojn por loĝado [<http://mekaro.ca/logxado.php>], inkluzive la Sheraton Hamilton Hotel, kie **oni povas rezervi ĉambron kontraŭ grupatarifo ĝis la 20-a de Aprilo 2017.**

Pliaj detaloj pri la renkontiĝo troviĝas en ĝia retejo [<http://mekaro.ca/>]. Ankaŭ eblas sendi demandojn al <esperanto.toronto@gmail.com> kaj <informo@mekaro.ca>. La retejo enhavas plenajn informojn pri la programo kaj pri loĝado. Ĝi inkluzivas ankaŭ aliĝilon, do (por helpi nian scion pri kiom da partoprenantoj venos), se vi jam certas, ke vi partoprenos, ni kuraĝigas vin aliĝi tuj [<http://mekaro.ca/aliĝilo.php>].

Venu kaj vidu la “Bruklinon de Kanado” – la kreskantan kaj dinamikan urbon Hamiltono. Ni atendas vin tie!

– *Matthew (Mateo) CHISHOLM kaj Jed MELTZER, organizantoj*

Montreala lingvofestivalo

La Montreala Lingva Festivalo okazos de la 25-a ĝis la 27-a de Aŭgusto, ĉe Universitato Concordia en Montrealo. Antaŭkongresaj aktivaĵoj okazos ekde mardo, la 22-a.



Ĉiuj lingvemuloj estas bonvenaj! Mi invitas vin viziti la oficialan retejon [<http://montreal.langfest.org/>] kaj ankaŭ niajn paĝojn en *Facebook* [<http://facebook.com/LanguageFestival>] kaj *Twitter* [<http://twitter.com/langfest>].

Mi kuraĝigas vin aliĝi grupe se vi povas; estas rabatoj por aĉetoj de pluraj biletoj.

– *Nicolas VIAU, <viau.nicolas@gmail.com>, vicprezidanto de ESK*

Novaj varoj en la retbutiko

- **T-ĈEMIZO: KIA VI SENTAS VIN**

HODIAŬ?

Tridek mienoj esprimas emociojn, ekz. *anksia* kaj *zorga*, ĉiuj kun priskriboj sube. Bonega instruilo. 1997. USA. \$13.00 (malgranda), \$13.43 (mezgranda), \$13.14 (granda), \$13.00 (grandega). Ligiloj: malgranda [<https://goo.gl/JLy69S>], meza [<https://goo.gl/cgHYSn>], granda [<https://goo.gl/4AEZHH>], grandega [<https://goo.gl/81mGWk>]



- **BULONJO-ĈE-MARO**

André CHERPILLOD

En 1905, la unua internacia kongreso sen interpretistoj okazis en Bulonjo-ĉe-Marco, Francujo. Jen historio de tiu unua kongreso, inkluzive de la prelego de d-ro Zamenhof kaj notoj pri la kongreso en Lillo cent jarojn poste. Inkluzivas bildojn de ambaŭ kongresoj. Teksto en Esperanto kaj la franca. Broŝurita, 61 paĝoj. 2016. Francujo. \$7.29 Ligilo [<http://bit.ly/2nqvHNS>]

- **TRAGEDIO APUD HILAO-RIVERO**

Edwin GROBE

Novelo el la serio *Pages from Arizona History*: blanka kvin-jarolino kaptita de indiano. 1993. Broŝurita. 16 paĝoj. Usono. \$2.12. Ligilo [<https://goo.gl/jgxJuQ>]

- **DENTOPASTO**

Ronald Cecil GATES

Gates verkis kelkajn mallongajn detektiv-rakontojn, kiuj ĉiuj okazas en Aŭstralio. En tiu ĉi rakonto, Inspektisto Nolan solvas bizaran murdenigmon. Bitlibro en formo PDF, EPUB, kaj MOBI. \$2.00 por nemembroj; senpaga por membroj. Ligilo [<https://goo.gl/N0Cc2R>]

- **ESPERANTO: LEARNING AND USING THE INTERNATIONAL LANGUAGE**

David RICHARDSON

The latest edition of David Richardson’s classic textbook is now available to members as a free download from the Esperanto-USA bookstore. Link [<http://bit.ly/2mHNp7g>]

• PERFEKTIĜO DE JOGO, LA

Svamio Prabhupada

Instruado de la spirita majstro (guruo) kaj fondinto de la *International Society for Krishna Consciousness (ISKCON)*, ankaŭ konata kiel la movado *Hare Krishna*. Broŝurita, 60 paĝoj. 2015. \$11.10 Ligilo [<https://goo.gl/vCiS8H>]

Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutikoj>].

Simpozio en Novjorko

Christine HÉLOT kaj François GRIN estos ĉefparolantoj en simpozio pri lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, organizita de la Studgrupo pri Lingvo kaj UN kunlabore kun la Centro de



Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. Hélot estas profesoro pri la angla lingvo en la eduka fakto de la Universitato de Strasburgo, Francujo. Ŝi aparte interesiĝas pri lingva justeco kaj la edukado de migraj infanoj. Grin estas profesoro pri ekonomiko en la traduka fakultato de la Universitato de Ĝenevo, Svislando. Li estas rigardata kiel gvida figuro en la kampo lingvo kaj ekonomiko kaj multe verkis pri tiu temo.

La dutaga simpozio okazos jaŭdon kaj vendredon la 11-an kaj 12-an de Majo en UN Church Center, 777 United Nations Plaza, Novjorko. Ĝi pritraktos la temon *Lingvo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj Vundeblaj Homgrupoj*. Pledantoj por la celoj pri daŭripova evoluigo, la ĉefa elemento en la tagordo de UN pri evoluigo en la periodo 2015-2030, emfazas la neceson atingi la plej vundeblajn homgrupojn unue – sed tiuj homgrupoj estas ofte izolitaj pro lingvaj bariloj kaj pro nerekonon de la bezono de dudirekta komunikado. La problemon pliakrigas la fakto ke tiuj vundeblaj homgrupoj daŭre pligrandiĝas pro la ĉiam kreskanta nombro de homoj dislokitaj el siaj hejmoj pro militagado.

La simpozio, kiu estas malferma al UN-personaro, neregistaraj organizaĵoj, esplorantoj kaj aliaj interesatoj, celas konsciigi personojn laborantajn sur la tereno de evoluigo pri la neceso kompreni kaj

aŭskulti la voĉojn de tiuj kiuj ofte restas neaŭskultataj, kaj antaŭenigi esplorojn pri tiuj problemoj. Detaloj pri la simpozio troviĝas ĉe <http://www.languageandtheun.org> [<http://www.languageandtheun.org>].

Forpasis Prenda Cook

Prenda E. COOK, kies nomo aperas en la danko paĝo de la lernolibro de David RICHARDSON (*Esperanto: Learning and Using the International Language*), forpasis en Comfort, Teksaso, la 9-an de Januaro 2017.

Prenda naskiĝis en Arkadelphia, AR, la 26-an de Decembro, 1918. Post studoj en mezlernejo, ŝi laboris dek jarojn kiel provleganto por loka ĵurnalo dum ŝi instruis multajn specojn de danco, inkluzive baleton kaj baldancon. Ŝi renkontis sian estontan edzon kiam li venis al dancklaso kun sia fratino.

Post kiam ŝi kaj ŝia familio translokiĝis al Odeso, TX, Prenda instruis la hispanan lingvon en mezlernejo. Pli ol sesdekjaraĝa, ŝi iris al la universitato *Sul Ross State University* en Alpine por kompletigi sian bakalaŭron kaj ŝi diplomiĝis *summa cum laude*.

Kiam ŝia edzo emeritiĝis, li kaj Prenda translokiĝis al Harlingen. En la loka biblioteko tie, Prenda malkovris la libron nomitan *Teach Yourself Esperanto*, kaj ĝuste tion ŝi faris. Ŝi iĝis arda defendanto de Esperanto kaj partoprenis NASK-on en Sanfrancisko kelkfoje. Ŝi estis ankaŭ entuziasma partoprenanto en kelkaj Landaj kaj Universalaj Kongresoj.

[*Multan dankon al Filipino DORCAS pro la nekrologo.*]

Korespondi deziras

Saluton el usona pundomo en Tucson. Mi estas 48-jaraĝa poeto, lingvisto, kaj instruisto de GED kaj lingvojn. Mi tre deziras korespondi kun usonaj kaj eksterlandaj samideanoj. Mi serĉas nek monon nek amon. Amika kaj intelekta interŝanĝo, kaj belaj poŝtmarkoj tre plaĉas al mi.

Mark HAMME #33391-379, U.S.P. Tucson,
P.O. Box 24550, Tucson AZ 85734



Mi loĝas en Bunda, ĉe la suda parto de lago Viktorio, en nordorienta Tanzanio. Mi lernis Esperanton de la gepatroj kaj en la grupo Bunda Esperanto Rondo.

Mi havas 13 jarojn, kaj mi estas en la sepa klaso de elementa lernejo. Mi ŝatas trovi eksterlandajn amikojn kaj korespondi kune. Mi volas korespondi pri studvivaj aferoj, libroj, historio, scienco, matematiko, ktp.

Yusuph Paul <yusuphpaul67@gmail.com>



Mi estas 19-jaraĝa studanto kaj komencanto. Mi loĝas en vilaĝo proksime de lago Tanganjiko en Burundo. Mi loĝas kun mia frateto kiu studas en meza lernejo. Mi serĉas geamikojn en la tuta mondo por korespondado.

NDAYISHIMIYE Jofred,
<rubindajofred@yahoo.com>



Mi nomiĝas Ivan kaj mi ŝatus korespondi kun alilandaj esperantistoj. Mi estas 43-jaraĝa italo, mi laboras en kultura instituto kaj studas historion, filozofion kaj lingvojn antikvajn kaj modernajn, inkluzive la planlingvojn.

Ivan ORSINI, <ivarpas@yahoo.it>



Mi estas sesdek-jaraĝa Teksasano. Mi estas malliberulo, kaj mi ne scias, kiam mi liberiĝos. Mi deziras korespondamikojn por plibonigi mian scion de Esperanto. Mi volus interparoli pri libroj (mi amas fantazion kaj hororon), religio, filozofio, kaj muziko.

**Ted COLE #1648258, Stiles Unit, 3060 FM
3514, Beaumont TX 77705**

libroj

Recenzo de *Aŭtuno en Printempo*

Steve EICHBLATT

Aŭtuno en Printempo [<https://goo.gl/NFyZYy>]

BA Jin

Tradukis Laŭlum. Ilustraĵoj de YAO Youxin.

Kortuŝa rakonto pri la sekvaĵoj de severa konformo al tradicio. Broŝurita. 97 pĝ. 1980. Ĉinujo. \$7.00.



Mendu en la retbutiko [<https://goo.gl/NFyZYy>].

Mi estas komencanta esperantisto kun inter tri kaj kvar monatoj de instruo. Mi ĵus legis la libreton *Aŭtuno en la Printempo* de la ĉina verkisto BA Jin. La libro estis verkita ĉinlingve en 1932; enesperantigis ĝin

Laŭlum.

Mi trovis la tekston sufiĉe facila por meznivelulo. La rakonto estas simpla kaj nelonga kun malmultaj roluloj. Samtempe, la lingvaĵo ŝajnas riĉa, flua kaj bela. Cetere, la ĉina papero havas fremdan delikatecon kiu plaĉas al mi.

La rakonto temas pri amo, forta ĝis malsano. Kompreneble, ĝi finiĝas triste. Vere, tiu temo ne min interesas tro (eble mi estas tro maljuna). Sed la tempo kaj loko – sudĉinuja urbeto en la jardeko 1930 – min interesas. Pli grande, la temo tuŝas la malliberajn morojn de edzeco ĉina en tiu epoko, kaj la pezan socian koston.

Mi trovas la libron *Autuno en la Printempo* leginda.

media hits

Princeton Alumni Weekly

The January issue of the *Princeton Alumni Weekly* has a lengthy article titled *A Language for Idealists* [<https://goo.gl/LBmytf>], featuring alumnus Esther Schor and her recent book *Bridge of Words*. An excerpt:

PRINCETON
ALUMNI WEEKLY

Although Esperantists like to think of themselves as politically neutral, the language's countercultural thrust is inherently political, Schor argues. Esperanto 'symbolized an alternative to the given, and certainly an alternative to totalitarianism, an alternative to repression and bigotry and to war,' she says. 'It's not partisan, but I think it's deeply embedded in the political nature of human beings.'

In addition to interviewing Schor, the author includes stories from other Princeton alumni about their own personal experiences with the language.

The Jewish News of Northern California

On March 3rd *The Jewish News of Northern California* published a story titled *Hebrew, Esperanto have some amazing stories to tell* [<https://goo.gl/lfrzh9>]. The second half of the article contains a positive review of Esther Schor's *Bridge of Words*. The reviewer adds:



Her account brought me back to my own college days when I took a correspondence class in Esperanto. Although I never got very far, I was struck by the priority that was placed on encouraging the spread and use of the language, which, as Schor explains, dates to Zamenhof's earliest efforts.

WNYC radio

On March 15th, *The Leonard Lopate Show* also interviewed Schor in a half-hour program titled *Building A Language for All* [<https://goo.gl/HNLObf>]. The interview, which can be streamed online for free, is described this way:



Poet and scholar Esther Schor joins us to discuss her book, [...]which details the history of a constructed language called Esperanto. She tells the story of Ludwig Lazarus Zamenhof, a Polish Jew, who in 1887 had the utopian dream of creating a universal language that would end political and ethnic conflict, and enable everyone to communicate.

Stanford News

On March 30th, the *Stanford News* published an article titled *Stanford students explore the vitality of the modern Esperanto movement* [<https://goo.gl/EkyH99>], detailing the research of students Bri Mostoller and Angelica Previte, who "became fascinated with Esperanto when they took a class in it at Stanford's Bechtel International Center." [*Could this be the class taught for many years by our own Trio Universero? –Ed.*]



[They] hope to fill a gap in existing research on Esperanto through their work. Rather than study linguistic properties, they instead focused on the community of Esperanto speakers. As 'integrated observers,' they sought to paint a vivid portrait of Esperanto today. Though they hope their research will garner interest from scholarly journals, Mostoller and Previte are more eager to engage the Esperanto community and the public at large.

The project won the Department of Anthropology's "Beagle II" award, a travel grant for undergraduate student researchers.

Prelego pri Esperanto en Sovetunio

NOVJORKO – La jaro 2017 markas la centan datrevenon de la Oktobra Revolucio, kaj du prelegoj en la Prelegserio Tivadar SOROS memorigos pri tiu okazintaĵo. Vendredon la 10-an de Marto, profesoro Brigid O'KEEFFE (Brooklyn College, City University of New York) parolis pri fruaj esperantistaj delegacioj al Sovetunio. En la jaroj tuj post la Revolucio, multaj laboristaj esperantistoj vizitis siajn rusajn kamaradojn por mem vidi la atingojn de la nova Rusujo. La rezultoj estis miksitaj: iuj esperantistoj rehejmeniĝis entuziasmaj, dum aliaj estis seniluziigitaj pro tio, kion ili vidis.



Frua soveta entuziasmo por Esperanto estingiĝis pro la pendolado al naciismo sub Jozef STALIN. La Esperanto-movado estis sovaĝe subpremata kaj ĝiaj gvidantoj estis ekzekutitaj aŭ ekzilitaj. Tiun evoluon priskribos, en la posta Prelego la 12-an de Majo, la germana historiisto Ulrich LINS. Liaj du libroj *Dangerous Language: Esperanto under Hitler and Stalin* kaj *Dangerous Language: Esperanto and the*

Decline of Stalinism ĵus (2017) aperis ĉe Palgrave Macmillan, en traduko el Esperanto de Humphrey TONKIN.

La prelego de O'Keeffe okazis ĉe CUNY Graduate Center, ĉe Fifth Avenue kaj 34th Street. Tiu de Lins okazos ĉe UN Church Center, 777 United Nations Plaza (First Avenue kaj 44th Street) je la 4-a ptm.

Por pli da informo, vidu <http://www.soroslectures.org> [<http://www.soroslectures.org>].

Esther SCHOR kaj Sam GREEN prezentis ĉe NYPL

NOVJORKO – La 15-an de Marto ĉe la Publika Biblioteko de Novjorko okazis prezento pri la vivo kaj historio de Esperanto fare de profesoro Esther SCHOR de la universitato Princeton (aŭtoro de *Bridge of Words*) kaj Sam GREEN, reĝisoro de la filmo *The Universal Language*.



New York
Public
Library


Donations received last year

Vilĉjo HARRIS

Here is a list of the E-USA funds and the total donations to each last year.

Funds not listed received no donations.

Fund name	Total (USD)
General	4,532.62
Gibson Endowment	365.00
Glenny	90.00
Life Membership	800.00
NASKE	5,395.10
Educational Video	300.00
Thompson	50.00
Schulze Education	140.00
CATW Education	845.00
Goldman Education	25.00
Wolff Publicity-Information	86.00
Klara Zamenhof	25.00
777 Fund	4,509.14
Amikeco Translimen	605.00
Festoj	971.50
Massey	5,000.00



Vilĉjo HARRIS

Vilĉjo estas direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA en Emeryville, CA.

de la estraro

Por ĉiu numero de *UE* mi petas la estraranojn iomete verki por sciigi al vi, kion ili lastatempe faris. Ili mem decidas kiel kaj pri kio raportoj: ĉu pri agadoj, ĉu proponi aŭ diskuti ideojn, ĉu instigi vin al kunlaboro en diversaj projektoj, ktp.

Kaj ne forgesu, karaj legantoj: ni volas aŭdi ankaŭ *viajn* demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro — ĉu en Esperanto aŭ en la angla. Sendu mesaĝojn por nia *leterkesto* al la redakcia adreso en la kolofono.

— *La redaktoro*

Julie SPICKLER, Vicprezidanto

Kiel Vic-Prezidanto, mi respondis antaŭ kelkaj semajnoj al mesaĝo de la Prezidento pri plano por Lingva Festivalo en Montrealo. La Festivalo okazos ĉi-somere, kaj la Kebeka Esperanto Asocio planas ĉeesti ĝin. La mesaĝo temis pri financaj kaj aliaj aferoj, pri kiuj mi devas lerni pli. Mi ankaŭ sendis surpaperajn dank-leterojn al ĉiuj, kiuj donacis al la fondusoj de E-USA dum la jaro. Mi ĉeestis la LK-on en Miami, kaj planas esti en Raleigh por la venonta LK.

Kaj jen ideo por la disvastigo de Esperanto: Mi ofte subskribas retajn petskribojn por subteni aŭ

kontraŭi kelkajn aferojn, kaj kutime estas loko por personaj/individuaj komentoj. Mia ideo estas skribi simplan, mallongan komenton en Esperanto, (uzante angla-similajn vortojn) kaj poste tradukon en la angla. Tiel ni montros, kiel simpla kaj komprenebla estas nia lingvo, kaj eble estos kelkaj kiuj ekinteresiĝos kaj trovos la retejojn *Lernu* aŭ *Duolingo*.



Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- George BAKER, Kasisto
- Jarlo BILLS, Direktoro
- Charlotte BURTON, Direktoro
- Jessica GRASSO, Direktoro
- Angela HARLOW, Direktoro
- Lucy HARMON, Direktoro
- Chris NELSON, Sekretario
- Andrew ROSENBAUM, Direktoro

La filozofio kiel feliĉilo

Hiram CRESPO

“Filozofio kiu ne sanigas animon estas ne pli bona ol kuracilo kiu ne sanigas korpon.”

– *Epikuro de Samoso*

Post la morto de Aleksandro la Granda, komenciĝis la helenisma epoko kaj la greka kulturo disvastiĝis tra la mondo konata, prenante kun si sian tre evoluitan filozofian tradicion, miksiĝante kun la budhismo oriente kaj kreante la gandaran kulturon, kaj aliloke kreante aliajn miksitaĵajn kulturojn kosmopolitajn.

Inter la saĝec-tradicioj tiam elportataj ĉien de la grekoj, troveblis la epikura filozofio: la unua filozofio misiista, humanista kaj nereligia. Anstataŭ ol promesi vivon postmortan kun porĉiama feliĉo ĉiela, ĉi tiu filozofio helpis la mortulojn trovi feliĉon en la mondo aktuala kaj instruis, ke ekzistas nur unu vivo: la aktuala. Do, oni devus ĝui ĝin, kaj fakte la epikura skolo estis hedonisma: ĝi instruis, ke la vivo devus esti plezurplena, ke oni devus indigi la vivon plenigante ĝin je plezuroj sanaj, naturaj kaj necesaj.

La epikuranoj ankaŭ sekvis la instruojn de Demokrito de Abdero, kiu kune kun Leŭkipo estis la unuaj atomistoj. Ili instruis, ke ĉio konsistas el partikloj, kaj li establis la bazojn de la moderna fizika scienco. En la Epistolo de Epikuro al Herodoto, oni trovas la unuajn konversaciojn

historiajn inter la atomistoj: ilia kosmovido enhavis doktrinon pri sennombraj planedoj, kaj ili eĉ opiniis ke ekzistas vivo aliplaneda, kaj simila kaj malsimila al la nia. Post kelkaj jarcentoj, la epikurano Luciano de Samosato verkis la unuan rakonton sciencfikcian dum la dua jarcento de la Komuna Erao, titolatan *Vera historio*.

La skolo ankaŭ donis al ni nian modernan koncepton kontraktan pri justeco, la plej koheran kontraŭ-superstiĉan diskurson de la antikva mondo, kaj vastan literaturan heredaĵon kiu enhavas kaj la epikan poemon de Lukrecio *Pri la naturo de la aferoj*, kaj malkaŝojn komediajn de ĉarlatanoj pratempaj kiel *Aleksandro la oraklovendisto* kaj *La morto de Peregrino* (de Luciano de Samosato). Sed ilia etiko estas la vera gemo de la heredaĵo epikura: la nuntempa scienco de feliĉo montras, ke pravis ilia emfazo de la virta amikeco, ilia insisto limigi kaj pripensi la dezirojn, kaj ilia scio pri la hedonisma adaptiĝo – la perdo de kapablo ĝui ion longdaŭre. Tial, ili rekomendis havi diversan ĝuaĵaron. Kion ni hodiaŭ scias pri la scienco de feliĉo, la epikuranoj jam sciis kaj instruis en sia etiko.

Ĉar ĉi tiu scio tiom gravas en nia mondo plena je konfuzaj valoroj kaj senlimaj deziroj, kaj por helpi disvastigi la filozofion noblan de la epikuranoj, mi publikigis *Epitomon*. La antikvaj epikuranoj ĉien iris kun eta epitomo, kaj poste, kiam ili jam lernis la bazon, kun ega epitomo, ĉiam studante la filozofion naturan kaj la arton feliĉe vivi.


Likva kolumno de tri koloroj

Vilĉjo HARRIS

Oni povas facile fari likvan kolumnon de tri malsamaj koloroj. Ĝi povas esti agrabla tabla dekoracio kiu aldonas ĉarmon al ajna ĉambro, speciale dum festo.

Materialoj

- ruĝa manĝokoloriga tinkturo
- blua manĝokoloriga tinkturo
- sukero
- akvo
- tri glasoj
- tre alta kaj klara vazego
- kulero



Preparo

1. Plenigu ĉiun glason per akvo.
2. En unu el la glasoj enmetu iom da sukero, kaj kirli ĝis la sukero tute solviĝas. Tiam aldonu iom pli kaj kirli denove. Daŭrigu ĝis la akvo ne povas solvi pli da sukero. Nun la solvaĵo estas saturita. Aldonu nun tri gutojn de la blua tinkturo kaj kirli ĝis la akvo estas unuforme blua.
3. En la duan glason denove faru saturitan solvaĵon de sukero per la sama procedo. Sed ĉi-foje, kiam la solvaĵo estas preta, forverŝu duonon en kloakon. Aldonu pli da akvo por anstataŭigi tion, kion vi ĵus forverŝis, kaj kirli denove. Tiu solvaĵo *ne* estas saturita.
4. En la trian glason metu tri gutojn da ruĝa tinkturo kaj kirli ĝis la akvo estas unuforme ruĝa. Ne enmetu sukeron. Vi nun havas tri

glasojn: unu kun blua solvaĵo de sukero, saturita; unu kun senkolora solvaĵo de sukero, ne saturita; kaj unu kun ruĝa akvo sen sukero.

5. Zorge verŝu la bluan solvaĵon en la vazegon.
6. Klinu la vazegon iomete kaj *malrapide* enverŝu la senkoloran solvaĵon. Verŝu tre malrapide, zorge, kaj atente, por certigi ke la tavoloj de blua kaj senkolora akvo ne intermiksiĝu.
7. Denove klinu la vazegon iomete kaj malrapide enverŝu la ruĝan solvaĵon. Denove, verŝu tre malrapide por certigi ke la tavoloj ne intermiksiĝu.
8. Nun vi havas likvan kolumnon de tri malsamaj koloroj: blua tavolo je la malsupro, senkolora je la mezo, kaj ruĝa je la supro.

Sciencaj klarigoj

Ĉiu tavolo en la kolumno havas malsaman densecon. La blua estas la plej densa ĉar ĝi havas la plej grandan kvanton da sukero. La senkolora tavolo estas malpli densa ol la blua ĉar ĝi havas malpli da sukero. La ruĝa tavolo estas la malplej densa ĉar tute mankas al ĝi sukero. La plej densa solvaĵo restas je la malsupro, la malplej densa je la supro, kaj la meze densa inter la aliaj du.

(Foto danke al Kelvin Song/Wikimedia, uzita laŭ permesilo CC-BY 3.0 [<https://goo.gl/VJ7M1B>].)



Vilĉjo HARRIS

Vilĉjo estas direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA en Emeryville, CA.

<eusa@esperanto-usa.org>

Mielmonato en Krimeo

Jed MELTZER

En Februaro 2016, mi spertis la feliĉan sorton edziĝi kun Deborah PERKINS-LEITMAN. Inter ŝiaj multaj ĉarmoj estis la fakto ke ŝi komprenas la gravecon de Esperanto en mia vivo, kaj kvankam ŝi ne estas flag-svinganta ĝisostulo kiel mi, ŝi decidis lerni la lingvon por dividi kun mi la plezuron kaj riĉecon de nia komunumo en nia kuna vivo. Deborah estas dumviva amanto de ĉio rusa, do estis facila decido por ni viziti Rusujon por nia mielmonato. Pro kialoj de ferioj kaj vetero, ni decidis prokrasti la vojaĝon ĝis Julio.

Do granda estis mia plezuro kiam mi hazarde rimarkis, ke okazos en Julio 2016 granda Esperantaranĝo en Krimeo – Krimeaj Esperanto Tagoj (KET), en la plaĝa urbo Jalto. Kvankam ni ne antaŭe konsideris iri al tiu regiono, la ideo ĉeesti Esperantan renkontiĝon dum nia mielmonato estis ja alloga. Deborah montrus al mi sian amatan Rusujon, kaj mi montrus al ŝi mian amatan Esperantujon. Do ni decidis je tri-semajna vojaĝo, al Moskvo, Sankt-Peturburgo, kaj Krimeo. La vojaĝo en Rusujo estis ĝenerale fascina, plezura, bongusta, neforgesebla. Sed vi povas legi multe pri la ĝojoj de turismo en Rusujo. Mi volas hodiaŭ paroli specife pri Krimeo.



Jed kaj Deborah (dekstre) ĉe la Krimeaj Esperanto Tagoj (KET).

Oni povas legi diversajn opiniojn pri la politika situacio en Krimeo, rilate al ĝia anekso el Ukrainujo fare de Rusujo en Marto 2014. Oni povas aŭdi la

saman diversecon de opinioj en la stratoj de la regiono. Mi ne intencas esprimi ĉi tie opinion pri kiu “flanko” de la debato pravas, sed mi volas doni mian impreson pri la nuna situacio tie, tri jarojn post la anekso, kaj la daŭra efiko de la ekonomiaj kaj politikaj sankcioj kiuj estis establita kontraŭ Rusujo kaj Krimeo.

Kelkaj faktoj estas ne disputeblaj. Krimeo estis aneksita fare de Rusujo la unuan fojon en 1783. Antaŭ tio ĝi estis ŝtato ligita al la Otomana Imperio. La plejparto de la loĝantaro dumlonge estas rus-parolanta, kvankam ankaŭ ekzistas diversaj minoritatoj kiel la islamaj Krimeaj Tataroj. En 1954, la Soveta ŝtatestro Nikita ĤRUŜĈOV decidis transdoni la Krimean duoninsulon el la Rusa Soveta Respubliko al la Ukraina Soveta Respubliko. Ĉar ambaŭ estis partoj de Sovetunio, la transdono estis administra afero kaj ne tiom grava. Sed post la disfalo de Sovetunio en 1991, la manko de Krimeo fariĝis granda strategia problemo por Rusujo. La urbo Sevastopolo estas dumlonge la plej grava bazo de la Rusa mararmeo, la sola granda bazo kun tut-jara senlacacia enirkapablo. Post la soveta disfalo, Rusujo aranĝis lui la bazon de Ukrainujo por 20 jaroj, kaj poste negocis por plilongigi la luadon.

En la pasintaj kelkaj jaroj, la rilatoj inter Rusujo kaj Ukrainujo pli kaj pli malboniĝis. Mi ne havas spacon priskribi tiun longan historion, sed multaj observantoj kredas, ke Rusujo decidis aneksi Krimeon por daŭre teni sian mararmean bazon tie. En Marto 2014, oni haste organizis referendumon en kiu granda plimulto de la krimeanoj voĉdonis por ekzisti de Ukrainujo kaj aliĝi Rusujon, kaj la rusa armeo tuj invadis la regionon por starigi la novan reĝimon. La referendumo preskaŭ certe ne estis farita juste, kaj ne agnoskita internacie, sed ŝajnas ke la rezulto probable estus same eĉ se perfekta referendumo okazus – ne tiom granda plimulto, sed sufiĉe por venki. En mia sperto en Krimeo, la vasta plejparto de la homoj tie konsideras sin rusoj, kaj preferas esti civitanoj de Rusujo. Mi tamen agnoskas, ke mi estis ĉefe en la plej suda parto de la duoninsulo, kaj tio povas esti la parto kiu plej forte

apogas Rusujon.

Do la referendumo kaj la anekso estas konsiderataj kontraŭleĝaj internacie, sed nun post tri jaroj, Krimeo jam integriĝis en la rusujan socion, kaj ŝajnas tre malprobable ke ĝi iam ajn revenos al Ukrainujo volonte. Do kion fari nun? Usono, la Eŭropa Unio, kaj aliaj landoj enkondukis sankciojn por puni Rusujon. Mi povas kompreni tion, sed vizitante la regionon, mi nun komprenas ke multaj el tiuj sankcioj specife punas la homojn kiuj loĝas en Krimeo, ne la tutan landon de Rusujo. Tiuj sankcioj inkluzivas la jenajn politikojn:

- Malpermeso de importado de varoj produktitaj en Krimeo
- Malpermeso de provizado de turistaj servoj al Krimeo
- Loĝantoj de Krimeo ne povas akiri vizon por Eŭropo nek Usono per siaj rusujaj pasportoj. Ili povas iri al Ukrainujo por akiri vizon, sed tio estas ege malfacila kaj kutime postulas subaĉetadon.
- Fremdaj bankokartoj kaj kreditkartoj ne funkcias en Krimeo. Do se vi havas *Visa*-karton de rusuja banko, ĝi funkcias, sed alikaze ne.
- Fremdaj registaroj ne provizas servojn al siaj civitanoj en Krimeo. Do mi (usona civitano) kaj Deb (kanada civitano) ambaŭ estis avertitaj, ke se ni spertus problemon en Krimeo, niaj registaroj ne helpus. Ni ĉiuokaze decidis iri ĉar ni havis helpon de esperantistoj, sed alikaze ni (kiel aliaj turistoj) elektus ne viziti la regionon.

Estas multaj aliaj ekzemploj. Ni spertis malfacilaĵojn pro la nefunkciado de la mon-rimedoj! Ni ne bone komprenis la situacion antaŭe, ĉar ĉiuj diris “jes, kompreneble kreditkartoj funkcias en Krimeo!” Alveninte, ni trovis ke estis tute maleble por ni uzi bankokarton aŭ kreditkarton, kaj ni devis draste ŝanĝi niajn vojaĝplanojn por elteni per la kontanta mono kun kiu ni venis. Sed tio estis interesa kaj ĝuinda finfine. Anstataŭ manĝi en restoracioj, ni ofte aĉetis simplan manĝaĵon en bazaroj kaj manĝis ĝin sur plaĝo. Anstataŭ loĝi en la luksa mielmonateca hotelo kiun ni estis elektintaj, ni loĝis

en studenta loĝejo kie la kongreso okazis, kun la aliaj partoprenantoj.

La politika situacio pezis en la konversacioj ĉe la kongreso. Estis evidente, ke okazis akra fendo inter la Rusuj-klinantaj esperantistoj de Krimeo kaj iliaj antaŭaj samlandanoj en Ukrainujo. Neniuj esperantistoj venis al KET de la ĉeflando de Ukrainujo, kvankam ili ĝuis longan kunlaboron kun la krimeaj esperantistoj antaŭ la anekso. Inter la esperantistoj kiuj venis de Krimeo, estis tamen diverseco de opinioj. Kelkaj ankoraŭ konsideris sin ukrainujanoj kaj nur heziteme akceptis la neceson akiri rusujan pasporton. Tiuj homoj estas rusparolantaj, etne rusaj laŭ propra priskribo, sed ili ne apogis la anekson. Sed tiuj homoj ŝajnis esti malplimulto. Estis mirinde, tamen, ke tiuj diferencoj de opinio neniel damaĝis la respekton kaj amikecon inter tiuj esperantistoj. Ili estis malnovaj amikoj dum jaroj antaŭ la anekso, kaj aktuala politika disputo ne povas tuŝi amikecon kreitan dum jaroj. Vere estis rara regalo por mi havi oportunon aŭskulti la konversaciojn kaj afablajn debatojn inter tiuj amikoj.

Mi certe ne scias, kio estos la fina rezulto de la anekso de Krimeo, sed ŝajnas al mi tre malprobable ke la loĝantaro tie akceptos reveni al ukrainuja civitaneco. Kvankam mi ne volas kuraĝigi agresemon de Rusujo kontraŭ siaj najbaroj, mi kredas ke finfine la mondo akceptos la realan situacion. Eble estas sence puni Rusujon per sankcioj, sed ŝajnas al mi maljuste puni precipe la loĝantaron de tiu regiono. Mi esperas, ke la vivo iam povos reveni al normala stato tie. Intertempe, la sankcioj fakte havas la efikon plirapidigi la integriĝon: izolado kaŭzas eĉ pli fortan ligon kun Rusujo. Se turistoj ne povas veni tien el aliaj landoj, nur turistoj el Rusujo venos, kaj nur opinioj el Rusujo estos esprimataj tie. Se krimeanoj ne rajtas negoci kun eksterlandaj firmaoj, ili negocos nur kun firmaoj en Rusujo.

Fine mi volas esprimi ke la regiono estas bela, ege interesa, kaj perfekte romantika loko por mielmonato. Malgraŭ la populara imago en Usono, Krimeo ne estas lando de milito kaj bomboj. Apenaŭ estis batalado dum la anekso (malkiel la milito kiu okazas en orienta Ukrainujo – tio estas alia afero). Ĝi estas lando kun riĉa historio, bona (sed dolĉa) vino, kaj belegaj pejzaĝoj. Pro manko de tempo kaj

nesufiĉa stoko de kontanta mono, ni ne povis vidi ĉion, kion ni volis, aparte la tatarajn lokojn kiel la urbo Baĥĉisarajo. Do mi esperas reveni tien iam, kaj mi esperas vojaĝi tien sen la politikaj kapdoloroj kiuj okazas nun!



Jed MELTZER

Originale de Pensilvanio, Jed estas neŭrosciencisto kiu nun loĝas en Toronto, Kanado.

<jedmeltzer@gmail.com>

enigmo-solvoj

La soifa jaĥtisto

En N^o 2017:1 aperis nia dua detektivo-enigmo. Kontraste al la unua enigmo, kiu allogis plurajn respondojn de niaj amatoraj detektivoj, la ĉi-foja lasis la redakcian keston preskaŭ tute malplena. Ĉu la krimo de Malliven estis tro ruza?

Prof. Ŝiboleto sciis, ke Malliven mensogis pri sia laŭdire senintenca mortigo de Robeĉjo. Sed *kiel* li sciis tion?

Leganto Rafael NOGUERAS (“Rafa”) lerte rimarkis la detalan priskribon de la kontuzoj sur la kadavro. “Se Robeĉjo estus batinta sian kapon kontraŭ la boatrandon,” rezonis Rafa, “li ne havus kontuzojn kaj en la antaŭo kaj en la malantaŭo de sia kapo.”

Nu, prave: unu bato kontraŭ boatrando ne kaŭzus du kontuzojn ambaŭflanke de la kapo, verŝajne. Sed memoru, kion diris Malliven: “Mi batis lin. Li frapis sian kapon kontraŭ la boatrando.” Efektive okazis du batoj, ŝajne de kontraŭaj direktoj. Do la duboj de Ŝiboleto kredeble rilatas al io alia... sed kio?

Leganto Douglas ZANDER rimarkis, ke Malliven “deprenis sian ĉapon por forviŝi ŝviton de la frunto.” Hmm! Se vere elĉerpiĝus la freŝa akvo antaŭ tri tagoj, Douglas rezonis, Malliven estus tiel soifega ke “li ne plu havus ŝviton por forviŝi.” Kaj ĝuste tion pensis ankaŭ Ŝiboleto. Pro siaj akraj okuloj, Douglas

ricevos \$5-rabaton de la libroservo. Gratulon!

Kaj dankojn al ambaŭ niaj ĉi-monataj partoprenintoj, ĉu ĝuste solvintaj la krimon aŭ ne. Ili ambaŭ sukcese diplomiĝas de la prestiĝa Detektiva Instituto de Esperanto-USA. Portu viajn ŝildojn fiere, karaj.



Murdo en oficejo

Daĉjo RUTAN

Detektivo Sennom denove petis helpon de profesoro Ŝibolet por solvi krimon. Sennom kaj Ŝibolet ĉirkaŭrigardis la oficejon de la mortinto, sinjoro Viktor Tim. Lia kadavro kuŝis sur la planko, malantaŭ skribotablo. Apud ĝia maldekstra mano estis malgranda pistolo de eksterlanda marko.



Ĉeestis ankaŭ atestanto, Mortimer Ginto. “Mi tuŝis nenion,” li diris, “krom la telefonon por voki la policon.”

“Diru al mi, kio okazis”, demandis Ŝibolet.

“Vik’ vokis min al sia oficejo. Tiam li akuzis min pri amafero kun sia edzino. Mi respondis, ke li ege malpravas, sed li ne trankviliĝis. Subite li ekstaris kaj kriis, ‘Mi mortigos vin!’ Fulmrapide li malfermis la supran tirkeston de la skribotablo, elprenis pistolon, kaj pafis al mi. Li maltrafis. Mi tuj repafis per mia propra pistolo... kaj li falis, mortinta. Mi nur

defendis min.”

Preinte krajonon el sia poŝo, Ŝibolet metis duonon en la tubon de la pistolo apud la kadavro. Li stariĝis, malfermis la supran tirkeston de la skribotablo, kaj zorge enmetis la pistolon.

Daŭrigis Ginto: “Mi havas permesilon por mia pafilo. Mi estas privata detektivo.”

Detektivo Sennom diris, “Ni trovis kuglon de tiu eksterlanda pistolo en la muro kontraŭ la skribotablo. La pistolo havas fingrospurojn de s-ro Tim, sed evidente li ne havis permesilon, do ni ne povas spuri ĝin.”

Ŝibolet diris, “Kompreneble vi akuzos Ginton pri murdo, ĉu ne?”

Kio misas en la atesto de Mortimer Ginto? Ĉu vi povas diveni? Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn. Bonvolu sendi **nur unu** solvon al la redakcio **antaŭ la 15-a de Junio**.

senintenca esperantaĵo?

F*ka

Fika [Fee-KA]



Life without Fika is unthinkable.

Jen danĝere malpudora reklamo de sveda kafo-firmao. (Dankon al Lee MILLER pro la trovo.)